# KOMUNISTA BIBLIOTEKO

**Manifesto de la sesa kongreso de la Komunista Internacio**
Eldono C.K. SEU
Moskvo, 1929

La broŝuro estas eldonita per la zorgoj de Komunista Frakcio de Sovetrespublikara Esperantista Unio. Traduko el la rusa lingvo estas plenumita de k-do E.Izgur (Kremenĉug) kaj, laŭ komisio de Lingva Komisiono ĉe C.K. SEU, kontrolita de k-do N.Nekrasov (Moskvo). Preslaboro estas plenumita de la presejo “Internacio” en Moskvo[1].

## Manifesto de la sesa kongreso de la Komunista Internacio

**Al ĉiuj laboristoj de la mondo, al ĉiuj laboruloj-kamparanoj, al subpremitaj popoloj de kolonioj, al soldatoj kaj militŝipanoj de la kapitalistaj armeoj!**

Gekamaradoj! Gefratoj!

La 6-a kongreso de la Komunista Internacio, reprezentanto de la revoluciaj laboristoj de ĉiuj mondpartoj, popoloj, nacioj kaj rasoj, levas sian voĉon el Moskvo – ruĝa ĉefurbo de la nova, konstruiĝanta mondo, kaj vokas vin, milionajn amasojn de popoloj, al la pretiĝo de ĉiuj viaj fortoj por kontraŭstaro kaj rebato kontraŭ la impertinentaj fortoj de la kapitalo.

Rabe ekspluatante laboristan forton, elpremante ĉiujn ĝiajn vivsukojn, febre amortizante la organismon de la proletoj, fariĝantaj kiel simplaj suplementoj al la kapitalista tekniko, metinte je la servo al la ora idolo mirindajn inventojn de la scienco, aplikante novajn mirigajn maŝinojn kaj aparatojn, pli kaj pli malvolvante la glitrubandon de la rapidproduktado kaj elĵetante milionojn da proletoj sur la pavimon, donante al ili ŝtonon, anstataŭ pano, – la posedanto de la mondo – kapitalo – militmarŝas kontraŭ la rajtoj kaj liberecoj de la laborista klaso, ankoraŭ pli malaltigas ĝian vivnivelon, levas sangan glavon de la blanka teroro kaj sub artifika ŝirmo de trae mensoga kaj putra frazo pri la paco de la tuta mondo, submetas detruigajn fugasojn de la nova tutmonda milito.

La imperialismo ree antaŭmetas la bajoneton en la tagordon. Ĉiutage pliakriĝas konkurado inter la plej grandaj ŝtatoj de la financ-kapitalistaj araĉoj, pli kaj pli fortiĝas ilia atako kontraŭ kolonioj, pli kaj pli fortike ili provas kuntiri la kaptoŝnuron ĉirkaŭ la giganta korpo de la Unio de Proletaj Respublikoj.

Usono, ĉe kies marpordego staras la obelisko de Libero, surmetas pli kaj pli certe sian manon sur la novajn landojn kaj kontinentojn inkluzive sur la antikvajn teritoriojn de sia ĉefa kontraŭulo – Britio.

Sidante sur firme kunnajlitaj monkestoj, pretaj krevi pro or-abundo, ankoraŭ ne delonge refandita el sango, verŝita sur la kampoj de Eŭropo, la usona kapitalo eksplodigas respublikon en Meksikio, sendas siajn punekspediciojn al Nikaragvo, tenas siajn batalŝipojn en la havenoj de Ĉinio kaj alligiante vicon da eŭropaj kaj sudamerikaj landoj per dika ora ĉeno de

[1] Мосгублит № 35.588. Зак. 833. Тираж 3.000. 39-я «Интернациональная» тип., Путинковский пер.3.

kreditoj, senĝene krias al ili: “Silentu”, kiam ili ne deziras plenumi ĝian sanktan volon.

Sur la bordoj de Pacifika oceano, sur la senlimaj teritorioj de Ĉinio, la usona kapitalo interpuŝiĝas kun la raba imperialismo de Japanio – impertinenta, artifikema kaj malica, kiu okupis jam per sia militistaro sufiĉe grandan parton de Ĉinio kaj kondukas eksterman militon kontraŭ ĉiuj fortoj de la ĉina popolo, kiuj ne deziras submeti sin al ĝia barbara, sanga reĝimo. Dekoj kaj milionoj da ĉinaj laboristoj, kamparanoj kaj metiistoj estas ĵetitaj sub la feran kalkanon de l’ japana imperialismo, kiu, venĝopunante la ĉinan popolon, pretigante teruran duelon kontraŭ sia usona kontraŭulo, dum la sama tempo aĉetas por si difinitan batalinterrompon per la kosto de provokaj atakoj kontraŭ Soveta Unio.

Tiuj ĉi atakoj estas ringo en la ĉeno de la komuna malamikeco de l’ imperialistaj ŝtatoj kontraŭ la ŝtato de proleta diktaturo, ŝtato, kiu vivas kaj evoluas, rekonstruiĝas ĉiuflanke, spite la malamikaj bestokrioj venantaj el la malamika tendaro kaj spite la tintado de armiloj, per kiu vane oni volas fortimigi kaj genufleksigi la socialistan diktatorecon de laboristoj.

Malgraŭ ĉiuj kontraŭdiroj inter la ŝtatoj de la kapitalo, malgraŭ ilia profunda kaj ĉiam pli kreskanta reciproka malamikeco, ili, gvidataj de Grandbritio, pretigas militon kontraŭ Soveta Unio. Ili preparas ĝin sistemece. Ili preparas ĝin per ĉiuj rimedoj. Ili preparas ĝin ĉiuhore.

Provo de financ-ekonomia blokado per vico da ŝtatoj de la potenca Usono ĝis la plorinda Aŭstrio, tiu ĉi kripligita dehakaĵo en la sistemo de eŭropaj ŝtatoj; nuligoj de diplomatiaj rilatoj kaj organizado de diplomatiaj kaj militaj aliancoj kontraŭ U.S.S.R., konstantaj provokaj minacoj el la flanko de la respubliko de marŝalo Pilsudski, tiu ĉi fieraĉa fisoldato, kiu cinike samrangigas la t.n. popolan reprezentantaron je prostituistinoj kaj kiu des pli laŭte piedfrapas per siaj botoj, ju pli hontinde kaj sklavhumile li lekas la botojn de generaloj kaj ministroj de Britio kaj Francio; preskaŭ malkaŝa laboro de l’ Ententaj militaj staboj en Baltaj landoj kaj en Rumanio; fine impertinentaj provokoj el la flanko de japana imperialismo, – ĉio tio devas sugesti alarmon al ĉiuj honestaj laboristoj, al ĉiuj proletoj, al ĉiuj subpremitoj de la mondo, kiuj konsideras U.S.S.R. sia vera patrolando, militakirita per varmega sango de la filoj de laborista klaso for de la bienuloj, kapitalistoj, perfortuloj, kruelaj malamikoj de laborula popolo.

Kondukante kriman militon en Ĉinio, bombardante ĉinajn urbojn, okupante ĉinajn teritoriojn, ŝtelante la lastajn fontojn de ekzistado ĉe la ĉina popolo kaj ekstremante ĝiajn plej energiajn filojn; pretigante atakadon de unu kontraŭ alia kaj organizante siajn fortojn por ekataki Union de Sovetaj Socialistaj Respublikoj, armiĝante ĝis la dentoj – sur la kontinentoj kaj sur la maroj, sub akvo kaj en aero; mobilizante la sciencon por la afero de plej ekstermiga, plej barbara malhomeca milito, kiu devas sufokigi la homaron per venengasoj kaj igi ĝin konvulsanta pro artifike inokulataj mortoportantaj malsanoj; aranĝante mezepokajn “simiajn procesojn” kontraŭ la teorio de Darvin, – kontraŭ tiu teorio, kiu estas plej rimarkinda teorio de la XIX jarcento; eldonante bestkruelajn leĝojn kontraŭ la “danĝeraj ideoj”; sidigante sur elektran seĝon Sacco-n kaj Vanzetti-n, – kiam subite ĉe hommilionoj ekhaltis la korbatalo kaj nevole elŝiriĝis el la brustoj ĝemo de venĝo kaj malbeno al la kapitalo – la “civilizitaj” rabuloj, viandistoj de generalaj staboj, friponoj de sekreta diplomatio, reĝoj da bankoj kaj trustoj, kune kun sia instruita kaj neinstruita, civila kaj eklezia aĉaro, krias pri barbareco de bolŝevikoj kaj pri sia “pacamo”.

La historio de la homaro ne konis paŝojn pli malicajn kaj bigotecajn, ideologion pli mensogan kaj abomenan ol la nuntempa “pacifista” ideologio de l’ imperialismo, kies ekstere politika “profesio” estas plej malnobla, plej barbara, plej kontraŭrevolucia kaj plej ekstermiga speco de milito. Ju pli furioze disvolviĝas la konkurado de armadoj, des pli energie ĝiaj oficialaj kaj neoficialaj agentoj konkuras en la produktado da “paca” frazaro, en produktado de “pacaj” paktoj, konferencoj, konsilkunvenoj, projektoj kaj proponoj.

La “Ligo de Nacioj”, tiu ĉi ido de Versajlo, ŝirmas la efektivan militan laboron de siaj anoj per preparo de projektoj pri malarmiĝo. U.S.S.R. senmaskigas la ludon; la grandaj pacamuloj rifuzas malarmiĝi. Diplomatia komedio transformiĝas je banala farso. Pacaj maskoj defalas, kaj al ĉiuj montriĝas la imperialista kojna dento.

Sed la “Ligo de Nacioj” estas unuavice kontraŭrevolucia, kaj samtempe kontraŭusona organizaĵo. Tial la respubliko de l’ dolaro per la buŝo de sia komizo metis sian “pakton” en la tagordon. La hegemonio de l’ usona kapitalo, posedanta plej bonajn maŝinojn, plej grandan provizon da oro, plej perfektan militan teknikon, devas ja serĉi sian internacijuran rekonon! La milito estas deklarata “malpermesita”. Japanio “ne militas” en Ĉinio: ĝi simple gardas siajn interesojn; Usono ne sufokigas per milito Nikaragvon: ĝi simple “defendas la ordon”; ĉiuj kapitalistaj ŝtatoj armas ne por milito: ili simple deziras batali por la “civilizo”.

Ŝirmante siajn imperialistajn aspirojn kaj siajn militajn planojn per fuma ŝirmo de pacifistaj paktoj (kontraktoj) kaj per malfortiganta veneno de pacifistaj babiladoj, la aferistoj de l’ imperialista politiko aplikas ĉiujn rimedojn por ĝustatempe bridi la laboristan klason, rompi la spinon de revolucia movado en la kolonioj kaj malplifortigi la malfronton de Sovetaj Respublikoj. Teroro kaj korupcio, senkompata ekspluatado de laboristoj kaj korupcio de iliaj gvidsuproj, seninterrompa fronto kontraŭ amasvastaj organizaĵoj, se la lastaj minacas iĝi danĝeraj, politiko de skismigo kaj senfortigo de laboristaj vicoj, ĉiam pli kaj pli fortiĝantaj policaj atakoj kontraŭ la komunistaj partioj, – jen estas la signo de la tempo. En Britio kaj en Usono, en Francio kaj Japanio ondo da represioj iras renkonte al la senprecedenta ondo da teroro en la faŝista Italio kaj sur la Balkanoj kaj al la amasaj mortekzekutoj en Ĉinio. La hakilo de burĝa “civilizo” funkcias senhalte, kaj per nemoviĝantaj okuloj imperialistaj ekzekutistoj rigardas siajn viktimojn, kvankam ili flarsentas, ke el la sango de ekzekutitoj kreskas miloj da venĝantoj.

En tiu ĉi tempo, kiam la tuta mondo odoras pulvon kaj sangon, kiam la kontraŭdiroj de kapitalismo denove estas streĉataj ĝis la ekstrema grado, kiam pliakriĝas la klasbatalo de la proletaro kaj leviĝas milionoj da koloniaj sklavoj, kiam por defendi la citadelon de l’ emancipmovadoj – U.S.S.R. – venas novaj kaj novaj vicoj da premitoj, – denove en la unuan planon elpaŝas la pefida rolo de la socialdemokratio, de la dua Internacio kaj de ĝia Amsterdama filio.

Laŭ la vidpunkto de klasinteresoj de la proletaro nun pli ol iam ajn necesas plena konscio pri la klasa izoleco de la proletaro, pri nepacigebleco de ĝiaj interesoj kun la interesoj de la kapitalo kaj kapitalista ŝtato. Responde al impertinentaj atakoj de la kapitalo, responde al malhomeca ekspluatado, al cenlaboreco, al la politiko de ruinigo de laboristaj organizaĵoj, al faŝista teroro – necesas proletara kontraŭatako.

Kaj ĝuste dum tiu ĉi tempo la bonzoj de social-demokratiaj partioj, senhonte perfidante, ĉiujn tradiciojn de klasbatalado, senhonte premante per porkaj hufoj elementaran fieron de la proletaro, predikas klasan kunlaboradon, “industrian pacon”, “mastruman demokration” sub la boto hufferigita per feraj najloj, boto de la trustigita kapitalo! “Industria paco” en ekonomiko, “koalicio kun la burĝaro” en la politiko, – tia estas la perfidula saĝeco de social-demokratio.

Laŭ la vidpunkto de klasinteresoj de la proletaro, nun precipe necesas senmaskigi ĉiun militan paŝon de burĝaro, atentigi pri la milita danĝero, alarmi. Kaj ĝuste nun la social-demokrataj politikistoj konstruas kirasigitajn ŝipojn, estas iniciatoroj de la plej malnoblaj “militaj leĝoj”, rampaĉas antaŭ la militarismo, aktive “plibonigas” la kapitalistajn armeojn, laŭdkantas la imperialistan Ligon de Nacioj, kalumnias Socialistan Union de Sovetaj Respublikoj, kortuŝe ĝojas pri la trompiga dokumento de l’ ekzekutistoj de Sacco kaj Vanzetti, glutas bonguste la venenan pacifistan salivon. Ĉiumaniere pravigante realajn militpreparojn de l’ imperialismo, ili samtempe akuzas U.S.S.R. pri “imperialismo”! Ili jam antaŭtempe genurampas en la ĉirkaŭprenojn de l’ imperialistaj generalaj staboj, tiuj ĉi herooj de l’ aŭgusto 1914! Ili jam staras kun etendita mano por ricevi rekompencon por tiuj tagoj, kiam ili en milita kasko staros en la burĝaj vicoj kontraŭ la soldatoj de la proletara revolucio!

Laŭ la vidpunkto de klasinteresoj de la proletaro nun pli ol iam ajn necesas unueco de l’ industria proletaro kun laborulaj amasoj de la kolonioj. Tamen la social-demokratiaj partioj stariĝas en tiu ĉi demando al la flanko de la premantoj, al la flanko de imperialistoj, al la flanko de rabistaj imperialistaj ŝtatoj kaj iliaj agentoj. Francaj socialistoj subtenas sian registaron kiam ĝi forbalaanta per urgana fajro de siaj pafilegoj la vilaĝetojn de rifkabiloj kaj siriajn urbojn; la registaro de Macdonald malkaŝe sufokigis Hindion, kaj nun anoj de la laborpartio plenumas en Hindio direktajn komisiojn de la brita burĝaro. Ĉiuj socialistaj partioj efektive subtenas siajn registarojn en la ĉina demando, permesante al si – sub la atakopremo – en ekskluzivaj okazoj genustarante fari timetan kritikan rimarkon. Bruxellesa kongreso de socialistoj, kiuj tute ne subtenis Kuo-Min-Tan dum la periodo de ĝia revolucia pasinto, malkaŝe solidariĝis kun la sama Kuo-Min-Tan, kiam ĝi iĝis sanga ĉefhundo de l’ imperialismo, kaj plej abomenaĉa ekzekutisto de laborista movado. La Bruxellesa kongreso akceptis vere hontindajn decidojn pri la kolonia problemo, preskaŭ laŭtekste kopiitajn laŭ dokumentoj de la subpremista Ligo de Nacioj.

Social-demokratio iĝis, tiamaniere, ĉefa forto malunueciganta la laboristojn de l’ industriaj landoj kaj laborulajn amasojn de la kolonioj.

Fine, laŭ la vidpunkto de l’ klasinteresoj de la proletaro nun pli ol iam ajn necesas unueco de laborista klaso mem. En la batalo kontraŭ la potenca organizita kontraŭulo, en la batalado kontraŭ grandegaj trustoj, en la batalado kontraŭ la ŝtata potenco de la kapitalo, kontraŭ tiu potenco, kiu staras ĉe la gardo de l’ interesoj de financkapitalista oligarkio, necesas maksimuma unueco de la vicoj laboristaj. Sed ĝuste nun, plenumante direktan mendon de la imperialista burĝaro, la social-demokratia agentaro de la lasta dissplitigas la laboristajn vicojn! La gvidantoj de social-demokratiaj partioj kaj de reformistaj profesiaj sindikatoj, la predikistoj de unueco kun la burĝaro, kun ĝiaj trustoj kaj kun ĝia ŝtato, la apostoloj de l’ industria paco kaj koalicio kun aferistoj de bankoj kaj borsoj faras ĉion eblan por eksigi komunistojn – kaj eĉ simple revoluciemajn proletojn – el ĉiuj amasaj

organizaĵoj. Ili skismigas la profesiajn sindikatojn, ili skismigas la sportistajn organizaĵojn, ili disbatas la vicojn de liberpensuloj-laboristoj. Ju pli decideme ili defendas la unuecon kun la burĝaro, des pli furioze ili batalas kontraŭ la unueco de proletaro.

La Komunista Internacio alvokas ĉiujn laboristojn kaj ĉiujn laborulojn al plej granda unuiĝo de iliaj vicoj, al unueco de la tuta laborista klaso kun laborula kamparanaro, al unueco de la proletaro kun la premitaj popoloj kontraŭ ĉiuj klasaj malamikoj.

La 6-a kongreso de la Komunista Internacio akceptis internacian programon, egale obligatoran por ĉiuj siaj Sekcioj. Unuafoje dum ekzisto de la revoluciema laborista movado la laborista klaso ricevas en siajn manojn programan dokumenton, kies tezoj estas leĝo por milionoj de organizitaj proletoj en ĉiuj partoj de la mondo kaj inter ĉiuj rasoj kaj nacioj de la tero. Ĝi ne estas dokumento de paca sklava rampado antaŭ la burĝaro kaj genurampa paco kun ĝi. Ĝi ne estas farisea, putra kaj malnobla deklaro de unueco kun la burĝaro, unueco, kiu signifas nenion alian, ol dizertadon al la tendaro de la klasa malamiko, dizertadon kaj perfidon. Tiu ĉi programo estas vojmontrilo en la batalado de milionoj da premitoj kontraŭ la premantoj, en batalado de proletaj amasoj, en batalado de laboruloj – blanke, flave, nigrehaŭtaj; sub la tropikoj kaj sur la malproksimaj kontinentoj de la planedo; en fabrikoj kaj plantejoj, en minejoj kaj sur la fervojoj, en la arbaroj kaj en la dezertaj stepoj – ĉie, kie estas la klasbatalo. Ĝi estas programo de unueco de la laborista klaso kaj mortbatalo kontraŭ la burĝaro. Ĝi estas programo de la neevitebla tutmonda diktatoreco de la proletaro.

La Komunista Internacio alvokas ĉiujn laborulojn al unuiĝo sub la standardon de la klasbatalado, de la proleta revolucio, de la diktatoreco laboristklasa. La Kapitalista mondo kun la granda streĉo de siaj fortoj, sur laboristaj ostoj, forpremitaj per la giganta premilo de ekspluatado, sub fajfo de sia sklavposedanta skurĝo, elrampis de sub la ruinaĵoj, amasigitaj per la unua imperialisma milito. Sed la kapitalista mondo jam denove komencas sufokiĝi sub la pezo de siaj kontraŭdiroj. La historia destino logas ĝin ree kun potenca spontana forto en la akvoturnon de grandegaj katastrofoj. Timante sian propran historian sorton, sed estante ĝia ilo; ne kuraĝante malligi la fantomojn de milito kaj samtempe farante ĉion, ke ili deŝiriĝu de la ĉeno kaj komencu sian sangan dancadon; trompante ĉiujn kaj ĉion per infana babilado pacifisma kaj penante palpetrovi la ĉanon de rapidpafantaj pafiloj, – la imperialista araĉo ree kondukas la mondon al la limo de neeviteblo.

La Komunista Internacio vokas ĉiujn laborulojn al kontraŭstaro. Jam nun necesas konstrui – senĉese, senlace, ĉiutage – la vicojn da batalantoj, unuecigi la amasojn, sendi siajn fidelajn kurierojn de la laborista klaso en armeon kaj ŝiparon, al soldatoj kaj maristoj, por pretigi la tagon kaj la horon, kiam responde je malnobla alvoko de l’ imperialistoj al reciproka buĉado de proletoj, returniĝos sur siaj aksoj la pezaj pafilegoj kaj pafilaperturoj, kiam la lastaj renkontiĝos kun la fruntoj de l’ imperialistoj, kiuj estos plej inda celtabulo dum la imperialista milito.

La imperialista besto, kiu kontemplacias per sia malpura okulo la nuran historion pasintan, ne kapablante leveti la kurtenon de l’ estonto, konsolas sin per iluzioj de relativa trankvilo en Eŭropo, ricevanta periode porciojn da viviga ora eleksiro de l’ amerika transoceana vampiro. Sed la sobra rigardo de la proleto, elportanta sur sia dorso ĉiujn ĉarmojn de la kapitalista raciigado kaj ĉiujn mokojn de l’ “industria paco”, distingas gigantan amasigon da kontraŭdiroj de la kapitalismo kaj de la en ĉiu loko kreskanta klasbatalado.

La striko en Britio, la Wiena ribelo, la strikoj en Germanio, la reago de germanaj laboristoj al la envica perfido el la flanko de l’ “kirasportanta” social-demokratio, la obstina kontraŭstaro de la ĉinaj laboristoj kaj kamparanoj, la kreskanta brulbolado de revoluciaj vulkanoj en Hindio, kie jam ekflirtis signala fumeto, la ĉiam pli kreskanta malkontento en Suda Ameriko, la kresko de memkonscio ĉe la negroj, kaj miloj da aliaj simptomoj, – ĉu ili ne parolas pri tio, ke la talpo de historio bone fosas?

La Komunista Internacio alvokas ĉiujn laborulojn, kaj, unualinie, la industriajn laboristojn, al batalado por ĉiu paŝo de militakiritaj pozicioj, al batalado kontraŭ la antaŭeniranta kapitalo, al batalado kontraŭ sklavigado de la proletaro, kontraŭ imperialista politiko, kontraŭ la milito. La Komunista Internacio vokas ĉiujn laborulojn kaj premitojn al sankta defendo de la ĉina revolucio, kapoj de kies martiroj kaj herooj falas sub frapado de ekzekutistaj hakiloj.

La Komunista Internacio alvokas ĉiujn honestajn proletojn unuiĝi kaj ekstari kiel fera muro ĉirkaŭ la Soveta Unio, super kiu la imperialismo levas sian glavon.

La Komunista Internacio vokas al plena deiro for de la burĝaro kaj al unueco de ĉiuj laboristaj vicoj en la senkompata batalado kontraŭ la malamikoj de proletaro.

Kontraŭ social-demokratia unuiĝo kun la burĝaro!

Kontraŭ social-imperialismo – por la kuraĝa subteno al la koloniaj gefratoj!

Kontraŭ pacifista mensogo – por plej sindona batalado kontraŭ imperialista milito!

Kontraŭ reformismo kaj faŝismo – por la proletara revolucio!

Vivu la proletara revolucio en U.S.S.R.!

Vivu la tutmonda proletara revolucio!

6-a Kongreso de l’ Komunista Internacio.
Moskvo, la 1-an de Septembro 1928.

Sovetlandaj geesperantistoj! Dissendu la Manifeston al ĉiuj viaj eksterlandaj korespondantoj!

Eksterlandaj proletaj geesperantistoj! Traleginte la Manifeston, legigu ĝin al ĉiuj viaj gekamaradoj – geesperantistoj, traduku ĝin en vian nacian lingvon, por ke ĉiuj viaj samlingvanoj konu bone la enhavon de tiu ĉi historia klasbatala dokumento!